

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



10

OKTOBRO 1960 * JARO XXIX

BULGARA ESPERANTISTO

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01.

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov,**
Stefka Aristova, Stefan Kiraĝlev,
Stefan Maserov, Simeon Simeonov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Reklamoj. Ekstera kovrilpaĝo: tuta
— 1000 levoj, duono — 500, kva-
rono — 280. Interna: tuta — 900,
duono — 450, kvarono — 250. Ko-
respondanoncoj — 10.5 levo por
vorto; eksterlandaj adresoj — sen-
page.

PERANTOJ DE «BULGARA ESPERANTISTO»

Albanio: Inĝ. Cefo Fico 44 Rruga
Stafa, Tiranë.

Koreo: Korea Esperanto-Asocio
Pjeng' jang, P. O. kesto 16.

Sovetunio: J. Kudrjavickij, PK 1255
Moskva K-9

Nederlando: Ru Bossong Flora-
plein 23, Eindhoven.

Rumanio: Mihail Popescu, Cal. 13
Septembrie 65, Bucuresti 5.

Ĉ N H A V O

- | | |
|---|----|
| I. Sarafov. Al pli variaj formoj
de propagando (ĉefartikolo) | 1 |
| Organiza vivo (Z. Velikov —
Pleven, Levskigrad, Kubrat,
A. Gaev — Asenovgrad, G.
Ganĉev — Dimitrovgrad, J.
Stanimirova — 15 tagoj en
Drujevo) | 2 |
| V. Oljanov. Ĉiu esperantisto —
abonanto de nia organo | 4 |
| N. Nikolov. La 16-a TEJO-Kon-
greso | 5 |
| J. Jovkov. La blanka hirundo | 7 |
| M. Stranĝanski. Al L. L. Zamen-
hof (versaĵo) | 10 |
| M. Langov. O, belsona nia lingvo
(versaĵo) | 11 |
| Tra la mondo | 11 |
| Por la internacia korespondanto | 12 |
| C. Murgin. Memorlibro pri Za-
menhof (recenzo) | 15 |
| Rido-ploro | 16 |
| Sur la kovrilo: El ĉarma Bulga-
rio | |

LA REDAKCIO akceptas ma-
terialojn por la koncerna nume-
ro de «Bulgara esperantisto»
ĝis la 12-a de la antaŭa monato.
Nur kiel escepto gravaj aktua-
laj materialoj estos akceptataj
ĝis la 25-a de la antaŭa monato.
La aŭtoroj estas petataj skri-
bi tre klare, kun granda interli-
nia spaco kaj marĝeno. Manu-
skriptoj ne estas resendataj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

AL PLI VARIAJ FORMOJ DE PROPAGANDO!

Nia movado senĉese atingas novajn sukcesojn. La esperantistoj gajnas la atenton de la socio. La sukcesoj nin ĝojigas, sed ili ne devas nin kontentigi. Ni ĉiam devas labori kaj por atingi novajn kaj tre gravajn sukcesojn, ni devas variigi nian propagandan laboron.

Iuj kamaradoj opinias, ke ni ne bezonas vastan propagandon, ke ni devas labori por la interna perfektigo de nia esperantista vivo, ke ni devas labori por la pli bona ekposedo de la lingvo. Ni substrekas la gravecon de simila laboro kaj ni neniam ĝin neglektis. Ĉiuj esperantistoj bone scias, ke la asocio kaj la societoj aranĝas kursojn, studrondetojn, maten- aŭ vesperfestojn, prelegojn, teatrajn prezentadojn ktp.

Sed ankaŭ ni ne devas flankenlasi nian pli vastan kaj varian propagandan laboron. Ni havas la rezolucion de UNESKO, UEA organizas kampanjon por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Tamen la socio scias malmulton pri tio. Do estas necese organizi pli bone nian propagandan laboron por konigi al la socio niajn atingajojn kaj sukcesojn.

En la pasinteco BEA organizis propagandajn, tiel nomitajn «verdajn» semajnojn, kiuj donis kontentigajn rezultojn. Ankaŭ nun ni bezonas tian propagandon. Per la propaganda semajno ni povas atingi kelkajn rezultojn: ni varbos novajn membrojn, ni altiros la malnovajn esperantistojn, ni kolektos abonantojn al «Bulgara Esperantisto», «Nuntempa Bulgario» k.a., ni vendos esperantajn librojn («Sub la jugo», «Bofilino», «Bulgario» k.a.) kaj ricevos monon por novaj eldonoj («Versaĵoj» de N. J. Vapcarov, «Bulgaraj rakontoj» k.a.). Ni havos eblecon publikigi propagandajn artikolojn en la centra kaj loka gazetaro. Bonan ekzemplon donas k-do Jordan D. Kalinov en Ruse per la konstanta esperanta rubriko en diversaj ĵurnaloj («Dunavski konservopromiŝlenik», «Elpromska iskra», «Dimitrovec» k.a.). Ni havos kontaktojn kun la lokaj kulturdomoj kaj ni povos organizi kun ili komunan agadon. Organizante ekskursojn al najbaraj lokoj, ni povas fondi novajn societojn, kaj se estas societoj, ni povas organizi interŝanĝon de sperto. Do, ĉiu povas konvinkiĝi, ke nia propaganda laboro povas kaj devas havi plej variajn, interesajn kaj rezultplenajn formojn.

Ĉiuj societoj, grupoj kaj unuopaj esperantistoj povas organizi tian

laboron en urbo, vilaĝo, entrepreno, oficejo, medio ktp., kie ili loĝas, laboras, oficas, funkcias.

Dum la propaganda semajno oni povas aranĝi esperantan ekspozicion kun libroj, lernolibroj, revuoj, ĵurnaloj, leteroj, bildkartoj ktp. Oni povas organizi letervesperojn kun ricevitaj el fremdlando pli interesaj leteroj, eĉ oni povas organizi specialan vesperfeston dediĉitan al aparta lando, urbo k.a., kiel faras la esperantista societo en Kazanlâk kaj en aliaj lokoj, utiligante ankaŭ magnetofonbendojn kaj aliajn rimedojn de propagando.

La rezulto de la propaganda semajno devas esti malfermo de novaj kursoj por komencantoj, progresintoj, de studrondetoj — ekz. por studado de la historio de nia movado, por studado de la esperanta literaturo k.a. Oni povas varbi ankaŭ kursanojn por la koresponda kurso. La kursoj devas esti bone preparitaj kaj malfermitaj per malgranda solenaĵo. Por la malfermo de la kursoj oni devas utiligi la treege gravajn dokumentojn: la cirkulero de la Centra Konsilantaro de la Profesiaj Unuiĝoj kaj CK de BEA de la pasinta jaro, kiu validas ankaŭ nun kaj la cirkulero de CK de Kom-somolo kaj de CK de BEA de la lasta somero.

La Centra Komitato decidis organizi la propagandan semajnon dum decembro 1960.

Gekamaradoj, komencu senprokraste la preparon de la propaganda semajno! Se ni bone organizos ĝin, ni povas atendi kontentigajn rezultojn.

Ai laboro senĉese, konstanta, rezultoplena!

ORGANIZA vivo

Pleven. Honore al la 1-a de septembro, la internacia festotago de la pachtalantoj kaj la 16-a datreveno de nia popola regado, s-ano Simeon N. Ĉorbaĝiev, aktiva esperantisto kaj veterano, membro de Esperanto-societo «Eterna amikeco», donacis al la societo bibliotekan ŝrankon kune kun multaj esperantaj revuoj kaj ĵurnaloj.

Ni elkore dankas al k-do Ĉorbaĝiev kaj skribis lian nomon en la societa honorlibro.

Zdr. Velikov

Levskigrad. La loka konsilantaro de la sindikatoj kaj la Esperantista societo «V. Levski» publikigis leteron por varbado de kursanoj. La kurso estos por komencantoj kaj daŭros 1 monaton.

Kubrat. Dum sia unumonata restado en Pollando samideano Ĥristo Dimitrov faris interesan prelegon en Esperanto je te-

mo «Nuntempa Bulgario». La prelego okazis je la 27-a de julio en la Internacia klubo de gazetaro en urbo Lodz. La prelego estis anoncita per afiŝoj, per Radio Lodz kaj per tri ĉiutagaj gazetoj. Multaj geurbanoj vizitis ĝin kaj la preleganto respondis al interesaj demandoj. La prelego estis samtempe tradukita en pola lingvo kaj la efiko estis tre granda.

Asenovgrad. La unuan de septembro gasto de nia societo estis nia malnova asenovgrada esperanto-pioniro kaj nuna prezidanto de Centra Komitato Ĥristo Marinov Gorov. Tiukaze estis kunvokita kunsido de la estraro kaj aktivuloj. Ĉeestis ĉirkaŭ 20 personoj.

Kamarado Gorov rakontis al la ĉeestantoj pri la stato de la Esperanto-movado en-kaj eksterlande. Krom tio li koncize priparolis la plej aktualajn taskojn starantajn nun antaŭ

la bulgaraj esperantistoj, kiujn la enlandaj societoj devas plenumadi en sia nuna kaj estonta Esperanto-agado. Post lia parolado estis starigitaj multaj demandoj kaj tre utilaj proponoj por plibonigo de la tutlanda Esperanto-agado. Fine k-do Gorov respondis al la starigitaj demandoj kaj dankis al la kamaradoj, pro iliaj bonaj proponoj.

La ĉeestantoj restis tre kontentaj de la renkontiĝo kaj esprimis deziron, ke estontece niaj centrakomitatanoj pli ofte vizitadu la Esperanto-societojn en la provinco, por ke

ili havu pli proksimajn impresojn pri ilia agado kaj samtempe aŭdu ion pri la malfacilaĵoj kiujn ili renkontas kaj eĉ, se estas eble, enloke helpi al ili.

At. Gaev

Dimitrovgrad. Okaze de la 9-a de septembro en la uzina kvartalo «Tolbuhin» estis malfermita dolĉaĵejo, kiu portas la nomon «Esperanto». La membroj de societo «Flamo» prizorgos pri ĝia ornamado kaj bona aranĝo.

G. Ganĉev

DEK KVIN TAGOJ EN DRUJEVO

Jam delonge mi revis somerumi en esperantista restadejo, sed mi eĉ ne kuraĝis kredi, ke tion oni povas facile efektivigi. Kaj jen, tute neatendite mi ekscias, ke tiu revo povas esti realo.

Mi iris en Drujevo sen interesiĝi pri detaloj, ĉar mi scias ke ĉiu komenco estas malfacila.

Mi pasigis 15 tagojn en Drujevo kaj mi estas ravita! Dum tiu tempo mi vere ripozis kaj sentis min feliĉa en nia esperantista medio. Nia loko (ĉar ĝi jam estas nia posedaĵo) estas vere beleaga! La ĉirkaŭaĵo ankaŭ! La

naturu malavare jetis multon el siaj ĉarmoj en tiujn lokojn.

Al kiu ajn direkto oni ekrigardus, oni vidas nur belajn, mirindajn rokojn, vastajn arbarojn de fortikaj fagoj, pitoreskaj altaĵoj kun interesaj nomoj, belaj herbaroj kaj majesta trankvilo! Tio estis la plej grava por mi, ĉar nome tiu kondiĉo estas plej necesa por vera ripozo, for de la bruoj kaj la polvo, for de la ĉiutagaj zorgoj kaj la dinamiko de la granda urbo.

Krom la beleco de la naturo tie ni ĝuis ankaŭ pri nia kolektiva esperantista vivo, pri gaja interparolado kaj babilado, pri senĉesa perfektigo en la lingvo. Kelkaj malperfektaĵoj kaj mankoj en la somerumejo tute ne malheligas la utilecon de tiu subteninda esperantista entrepreno. Mi kredas, ke ĉiu vera esperantisto ĝojos kaj fieros pri nia propra restadejo. Ĝi ja estas nia unua posedaĵo! Ni subtenu ĝin ĉiu laŭ sia ebleco.

Ni sekvu la ekzemplon de kamaradino Mara Popova el Pleven, kiu donacis por nia tendaro blankan ŝtofon por du tablokovriloj.

Kunhelpu, por ke ni ĉiuj renkontiĝu pli amase dum la sekvonta jaro en la bela Drujevo.

J Stanimirova, (Burgas)



ĈIU ESPERANTISTO — ABONANTO DE NIA ORGANO

La kongreso en Târnovo montris, ke nia movado estas jam konsiderinda socia forto. La kongresaj decidoj certigas ĝian pluan evoluadon kaj organizan stabiliĝon. Por tiu celo multe helpas nia organo «Bulgara Esperantisto». Ĉar ja ĝi estas ne nur propagandilo kaj agitilo, sed ankaŭ organizilo, unua helpanto de nia CK. En ĝi nia asocia estraro donas instrukciojn, konsilojn, publikigas siajn gravajn decidojn, per BE ĉiu esperantisto ricevas ĝustajn informojn pri la movado en la lando kaj ekster ĝi, BE proponas al siaj legantoj agrablan kaj utilan legaĵon, donas lingvajn konsilojn, informas pri aperintaj libroj kaj aliaj esperantajoj.

De ĉio ĉi sekvas la neceso, ke ĉiu esperantisto ricevadu kaj legu nian presorganon. En la kongreso estis riproĉitaj iuj societaj estraroj kies anoj mem ne estas abonantoj! Tiuj hontindaj faktoj plu ne devas ripetiĝi. Kiamaniere oni gvidos la societon ne legante kaj ne pristudante nian gvidilon, nian organizilon! En la nuna etapo de disvolvo de nia movado ni ne povas plu toleri neaktivajn, neinformitajn kaj nespertajn estrarojn. Pri la neceso, ke ĉiu estrarano kaj aktivulo devas ricevi gazeton «Bulgara Esperantisto» ni plu ne devas paroli. Tio jam estas konsciita maksimumo. Nun temas pri abonigo de ĉiuj esperantistoj senescepte. Ne povas esti bona esperantisto tiu kiu ne legas, ne ekzercas la lingvon. BE multe helpas pri la perfektigo en la lingvo per sia varia legaĵo. Iuj preferas eksterlandajn gazetojn. Kaj tiu intereso ne estas malbona. Sed unue ni devas legi nian propran organon. Ĝi faros nin bonaj, celkonsciaj aktivuloj-organizantoj. Krome, estas konataj la malfacilaĵoj pri ricevo de eksterlandaj gazetoj. Ili ne venas regule kaj pro tio la abonantoj koleras. Pro ĉiuj ĉi kaŭzoj plej utile kaj plej favore por la bulgaraj esperantistoj estas aboni unue al BE.

Ekde la komenco de novembro ni komencas akcepti abonpagojn por la nova 1961 jaro. Kiel ĉiujare ankaŭ nun ni faros rabaton al la fruaj abonintoj. Do, ĝis la fino de decembro la abonpago estos 12 levoj. La rabato validos nur por la tutjara abono. La duonjara abono restas 7 lv. Escepto pri la limdato ni ne faros. La pasintan jaron iuj kasistoj sen serioza kaŭzo tenis ĉe si la kolektitajn sumojn kaj poste ili petis nin akcepti ilin kun rabato post la fino de decembro.

Tio estas krimo al la abonintoj, kiuj fidis al la koncerna aganto pagante la sumojn kaj ankaŭ al la asocio. Tiajn kompromisojn ni ne faros. Kiu estas nedisciplinita kaj maldiligenta devas pagi mem pri tio. Je la unua de januaro la abono kostos jam 14 lv. kaj pri nenia escepto oni povas pritrakti.

La estraranoj, la societaj aktivuloj, niaj korespondantoj kaj agantoj devas tuj komenci antaŭprepari la kampanjon. Ni premios ĉijare same la aktivulojn kiuj atingis plej grandajn rezultojn en la abonigado. Ni publikigos la nomojn de ĉiuj, kiuj abonigis almenaŭ 10 samideanojn. Ni devas fari ĉion eblan, ke ĉiuj esperantistoj en Bulgario dum la nova jaro ricevadu nian organon. Tio efikos tre utile al la movado.

Ĉiu esperantisto — abonanto de «Bulgara Esperantisto»!



LA 16-a TEJO-KONGRESO

Areto da bulgaraj geesperantistoj frue frontis la grandegajn valutajn, pasportajn, vizajn kaj aliajn malfacilaĵojn por partopreni la 16-an TEJO-kongreson. Sed kiam alproksimiĝis la kongresa semajno evidentiĝis, ke oni devis komenci la klopodojn ankoraŭ pli frue, ĉar nek unu el ni havis enirvizon. Mi petis samtempe nederlandan kaj belgan enirvizojn, sed estis necesa unue la nederlanda vizo, ĉar la kongreso de TEJO ĉiam okazas semajno antaŭ la Universala Esperanto-Kongreso. Mia pasporto ĝemis pli ol du semajnojn en nia ambasadejo en Beogrado (en nia lando ne estas legacio de ŝia moŝto la reĝino de Nederlando) kaj atendis la bonvolon de la koncernaj reĝinaj instancoj. Fine mia pacienco elĉerpiĝis kaj mi petis resendon de la pasporto, por ke mi ne preterlasu ne nur la junularon, sed ankaŭ la Universalan Esperanto-Kongreson.

Je la kvara kongresa tago frumatene mi forveturis per aviadilo al Amsterdamo. Pri la veturado, la malfacilaĵo en la flughaveno kaj la helpemo de la Lo-Ko-Ko mi ne parolos, ĉar mia tasko estas skribi pri la kongresaj aranĝoj kaj ne pri miaj personaj aventuroj. Ilin mi povos rakonti al la interesigantoj antaŭ glaso da bongusta konjako, brando aŭ vino... ĉar la nova esperantista federacio ne konsideras la trinkadon kaj la fumadon unuj el la plej grandaj pekoj.

Per aŭtobuso mi veturis de la flughaveno de Amsterdamo al Roterdamo. En la lasta atendis min membro de Lo-Ko-Ko, kiu aspektis kiel

patro de la ceteraj komitatanoj. Manpremoj, ĝojo, babilado kaj multaj aliaj aferoj okazis ĝis kiam venis la aŭtobuso, kiu forportis min al la kongresejo. Ĉe ĝia pordo komencis mordi min la dubo, ĉu mi ne eraris. Estis videbla nek slogano, nek standardo, kiu povis montri al la preterpasantoj, ke ĉi tie situas la Junulara Esperanto-Respubliko. Post granda peno mi sukcesis rimarki etan flageton, kiu honteme kaŝiĝis.

Post duminuta marŝado tra unu el la aleoj de belega parko mi eniris la kongresejon. Lasante la kofrojn en la koridoro mi eniris la salonon, kie mi komencis kongresadi. Kun bedaŭro mi konstatis, ke Ivo Lapenna ĵus finis sian interesan paroladon pri la rolo de la junularo en la nuntempa Esperanto-movado. La viglaj debatoj inter la aŭskultantoj kaj la preleginto montris al mi, ke vere mi maltrafis interesan prelegon. De la partoprenantoj mi eksciis, ke ĝis nun okazis ankaŭ prelego de prof. Neergaard, kiu estis parolinta je temo «La lukto kontraŭ la malsato», oratora konkurso kaj oficiala akcepto en la urbo-domo.

La oratoran konkurson partoprenis tri gejunuloj, la 11-an premion gajnis la germanino Eliza Velde parolante pri la temo «Ĉu la nuntempa junularo havas idealojn?»; per la sama temo estis gajninta la duan premion John Vels (Britlando) kaj trian — Humfrej Tonkin (Britlando), kiu parolis pri «Rapideco».

Vespere unuafoje mi gustumas la nederlandan kuirarton kaj ĝi nek pla-

ĉis, nek malplaĉis al mi. Tamen mi ne povis alĉutimiĝi al ilia prefero manĝi preskaŭ ĉiam malvarmajn manĝaĵojn.

La kongreson partoprenis iom pli ol 120 gejunuloj el deko da eŭropaj landoj. Mi estis la sola reprezentanto el la socialismaj landoj. La malgranda nombro de la partoprenantoj (intence limigita de Lo-Ko-Ko pro manko de loko en la kongresejo) faras por mi ankoraŭ pli nekomprenebla la aliĝo de granda grupo gelernantoj el Anglio, kiuj preskaŭ scipovis la vortojn «Bonan tagon» kaj «Ĝis revido» kaj ilia gvidanto kaj instruisto parolis la lingvon per tia terura angla akcento, ke oni povis per granda peno kaj streĉo de la atento deĉifri kion li diras.

Interesa estis la tuttaga ŝipekskurso al la tiel nomata «Delta-Projekto», kiu komprenigis al ni la fervoron de la nederlandanoj en la ĉiama lukto kontraŭ la maro por pene akiri alian fekundan grundon. Tiurilate ili havas konsiderindajn sukcesojn.

La 27-an de julio okazis la sportokaj leterkonkursoj. Fakte la konkursoj estis amuzkonkursoj ĉar granda parto de la partoprenintoj neniam sportis. Ekzemple ludis volejbolon anglaj gejunuloj, kiuj eĉ la plej simplajn regulojn de la ludado ne konis. Kompreneble tio nur amuzigis la publikon konsistanta de la aliaj kongresanoj.

La laborkunsidoj de la Komitato estis tre oftaj. Ni pridiskutis la ĝisnunan agadon de TEJO kaj ties estaro kaj elektis novan: Gunter Becker, prezidanto; Rihard Rehlin, vicprezidanto; Marek Pietrzak, vicprezidanto; Nikola Minaja, ĝenerala sekretario; Glanko Pompilio, kasisto; Ivo Osibov, redaktoro de la rubriko «Juna vivo» en revuo «Esperanto»; Nikolaj Nikolov, kontakto kun neesperantistaj organizaĵoj; inĝ. Simeon Simeonov,

informado kaj Henrik Reiter, sporto kaj junularaj renkontiĝoj.

Kiel vi konstatis niaj reprezentantoj en la komitato duobligis, ĉar estis elektita ankoraŭ inĝ. Simeonov. Li ricevis ankaŭ sian unuan urĝan taskon: verki la tekston de flugfolio taŭga por propagando de Esperanto en junularaj medioj.

Estis komisiita al la Junulara Sekcio de nia Esperanto-Asocio kolekti kaj ordigi kantojn taŭgajn por kompilo de internacia junulara kantaro.

Multajn diskutojn provokis la financa stato de la organizo. Ni ĉiuj estis unuanimaj, ke UEA devas subvencii pli malavare TEJO-n kaj krom tio ĝi devas ricevi procenton de la pagoj por la junulaj asociaj membroj de UEA.

La kongreso akceptis rezolucion per kiu ĝi turnas atenton al la komitato de UEA kaj al la landaj Esperanto-organizaĵoj, ke ili finance kaj alimaniere devas subteni la Esperanto-junularon.

Granda manko de la kongreso estis la foresto de la kontakto kun la neesperantista publiko kaj precipe la junularo. El propaganda vidpunkto nia kongreso en Roterdamo malsukcesis, sed tio ne estis la plej grava tasko de la kongreso.

Mi persone opinias, ke estas lukso la ĉiujara organizado de kongresoj. Tion mi priparolis en Bulgario antaŭ la kongreso kun polaj junularaj gvidantoj kiuj samopinias. Eble ni devas pridiskuti tiun ĉi problemon dum la venonta kongreso.

La oficiala parto de la kongreso estis interesa, sed por mi grandan signifon havis la amikaj interparoloj, ofte ĝis noktmezo kun multe da kongresanoj. En ili mi konstatis la soifon de ĉiuj partoprenantoj vivi en paco kaj interkompreniĝo, vivi pli bone kaj lukti por pli bona estonto de l' homaro.

Nik. Nikolov

Jordan Jovkov

LA BLANKA HIRUNDO*

Jam en la unua momento, defendante lin de la hundoj, Petro Mokanin komprenis, ke tiu ĉi nekonata vilaĝano ne venis al li senkaŭze, ke li estas trafita de ia malfeliĉo. Pro tio ja li koleris kontraŭ la hundoj, insultis ilin kaj denove ĵetis rigardon al la vilaĝano; laŭ la ruĝa jako oni povis diveni, ke li devenas el la regiono de Deliorman. Alta, grandkorpa li estis; sed ke li estas malriĉulo, kaj ŝajne malriĉulo ne estas naskiĝinta — ankaŭ tio estis videbla: sur lia ĉemizo troviĝis multaj flikajoj, en grandaj pecoj kaj mallerte alkudritaj, la zono estis eluzita, la pantalono ankaŭ. Li estis nudpieda. Laŭ la ekstera aspekto li estis impona kiel monto, sed Mokanin tuj pritaksis lin, ke li estas iu el tiuj mildaj bonanimaj homoj, kiuj — kiel oni diras — cedas la vojon eĉ al formiko.

La kamparano salutis, elmurmuris ion similan al: «Kiel vi fartas? Ĉu bone?», sed evidente li pensis pri io alia, en liaj okuloj oni povus tralegi alian zorgon. Kaj rigardante, ien antaŭen kaj montrante per la mano, li demandis, ĉu en tiu direkto troviĝas la vilaĝo Manĝilari kaj kiom longe oni devas veturi ĝis tie. Mokanin klarigis al li kaj nur nun li rimarkis, ke sur la ŝoseo estis haltinta veturilo kun unu ĉevalo. Tiun ĉi veturilon la kamparano estis lasinta por veni al li. En ĝi sidis virino kurbiĝinta, ŝovinta la manojn en sian sunon; ŝia kaptuko estis malligita, ĝiaj ekstremoj pendis ambaŭflanke, por ke ŝi iom refreŝigu sin. Estis ja treege var-

me, sed Mokanin sciis, ke kiam la virinoj lasas sian kaptukon malligita, ilin turmentas ne la varmego, sed io alia. En la malantaŭo de la veturilo, kovrita parte per tapiŝo, metinte la kapon sur nigrajn vilaĝanajn kusenoj, kuŝis alia virino, pli malgranda, probable junulino. Ŝi rigardis flanken kaj oni povis vidi ŝian vizaĝon.

— Ŝajnas al mi, ke vi havas malsanulinon — diris Mokanin.

— Jes, mia filino malsanas.

La kamparano ĵetis rigardon al la ŝafoj, kiuj ripozis en la tagmeza horo sur la herbejo, liaj okuloj restis fiksitaj al ili, sed li ne vidis ilin, kaj lia zorgoplena rigardo ĉirkaŭvagadis ien malproksime.

— Granda estas nia malfeliĉo — li diris — prefere ni ne parolu pri ĝi.

— Vi ne estas ĉitieulo, de kie do vi estas? — demandis lin Mokanin.

— De Kiĉuk-Ahmed. Nadejda ŝi estas nomata nun, ĉe la Rokego. Mi jam estis foje en via regiono. Mi rondiras la vilaĝojn, vendas stukargilon, bonan argilon oni elfosas ĉe nia vilaĝo. Bona ĝi estas, aĉetas ĝin la virinoj. Kiam mi iras malsupren al la maro, mi aĉetas fiŝojn, aŭ vinberojn, aŭ kion mi povas trovi, por vendi ĝin sur la returna vojo. Dank' al Dio, ni vivtenas nin. Se nur tiu ĉi malfeliĉo ne estus okazinta...

Li sidiĝis sur la teron, elpoŝigis ledan tabakujon kaj komencis fari al si cigaredon. Mokanin sidiĝis apud lin kaj vidis, ke liaj dikaj kalaj fingroj tremas, preparante la cigaredon.

— Niaj infanoj ne vivas longe —

* El baldaŭ aperonta novelaro «Bulgara prozo». La volumo, redaktita de Asen Grigorov, enhavos ĉirkaŭ 20 novelojn de eminentaj bulgaraj verkistoj.

li komencis. Tri mortis jam malgrandaj. Jen tiu nur restis al ni (rigardis al la veturilo). Ni gardis ŝin kiel nian pupilon, el mia propra manĝaĵo mi ŝparis, por aĉeti ion al ŝi, por fariĝi al ŝi vestojn, ke ŝi ne suferu, rigardante la aliajn junulinojn. Kiel ajn, dank' al Dio, ĝis nun ni konservis ŝin. Sed de kelka tempo ŝi ne fartas bone. Oni ne malkovris malsanon sed ŝi velkas. Al la patrino ŝi diris, ke ŝi malĝojas, ĉar ŝiaj amikinoj jam edziniĝis, kaj ŝi restis ankoraŭ fraŭlino. «Kial vi ĉagreniĝas pro tio, filino mia — mi diris al ŝi — ankaŭ vi ja trovos vian feliĉon. Vi ne komparu vin kun la aliaj fraŭlinoj — riĉaj ili estas. La nunaj fraŭloj tiaj estas — riĉajn junulinojn ili serĉas. Ankaŭ vi edziniĝos, ne faru vi zorgojn, ankoraŭ juna vi estas.»

— Kiom da jaroj ŝi aĝas?

— Ĉirkaŭ dudek. Nun, je la festotago de la Sankta Dipatrino, ŝi finos dudek.

— Ja ankoraŭ juna estas la knabino.

— Vere juna.

La kamparano faris paŭzon, kaj denove rigardis al la ŝafoj, ne vidante ilin. Ie proksime en la varmego ĉirpis cikado.

— Ĉi-somere ŝi petis min lasi ŝin rikolti. Malriĉaj ni estas, ni bezonas monon, sed rigardante ŝin tiel malfortika, malsanema, mi ne emis lasi ŝin. — Mi petas vin, paĉjo, lasu min iri, ankaŭ mi volas iri kun la junulinoj. — Bone, se tiel estas, mi lasis ŝin iri. Kaj kio poste okazis, mi ne scias, mi ne estis tie. Sur la kamparo ili pasigis tagojn kaj noktojn. Mi scias nur tion, kion ŝi mem rakontis al mi. Foje, ili rikoltis la tutan tagon, vespermanĝis, poste la junulinoj kantis, ŝercis, fine kuŝiĝis. Nonka, tiel estas nomata mia filino — ankaŭ kuŝiĝis. «Mi kuŝiĝis, paĉjo, — ŝi diris — inter la garboj, sub unu garba-

maso, ŝirmita kontraŭ la vento, por ke ĝi ne blovu al mi, kaj mi kovris min. Kaj mi endormiĝis. Subite mi sentis ion pezan — ŝi diris — ion malvarman, jen tie ĉi, sur la brusto. Mi malfermis la okulojn: serpento!»

— Ha!

— Jes, serpento. Ĝi kuŝis tordiĝinta spirale sur ŝia brusto. Monka kriis, kaj malgraŭ sia timego, ŝi kaptis kaj forĵetis ĝin.

— Ŝi forĵetis ĝin! Tio ja okazas dum la tempo de la rikoltado. Mi jam aŭdis, ke serpento eniris eĉ la buŝon de iu virino. Sed tiu serpento ne mordis ŝin, ĉu ne?

— Ne, ne mordis. Ĝi estis kuŝiĝinta sur ŝian bruston, Nonka prenis kaj ĵetis ĝin for. Tiel ŝi rakontis al mi. Ĉu tio estis sonĝo aŭ ĝi vere okazis — mi ne scias. Sed de tiam la knabino ne fartas bone. Jen, vidu ŝin, velkinta ŝi estas, kvazaŭ branĉeto. La brusto doloras ŝin. «Tie — ŝi diras — kie kuŝis la serpento, tie doloras min.»

Vidu nur, kia stranga afero! — miris Mokbanin — Kaj nun kien vi veturigas ŝin? Ĉu al kuracisto?

— Ho, kuracistoj, ĉe multajn kuracistojn ni iris. Nun mi kondukas ŝin... hm... kiel mi diru al vi... Kio koncernas min, mi mem ne kredas, sed ili ja estas virinoj... kaj ŝi estas malsana, ja mia filino ŝi estas...

Lia voĉo ekstrems kaj li eksilentis. Li fiksis la rigardon sen ia kaŭzo komencis tiri jen la lipharojn, jen la barbon delonge nerazitan, malmolan, en kiu estis videblaj tutaj fasketoj da blankaj haroj. Oni ne bezonis diri al Mokbanin, ke ĉiu blanka haro estas postsigno de iu zorgo.

— Antaŭhierau — rakontis plu la kamparano — niaj samvilaĝanoj revenis de la haveno. Ili sciigis tiun ĉi rimedon — mi ne scias, ili estas homoj senzorgaj, eble ili eĉ ŝercis. Tiam al ni rapide venis la edzino de Stojan,

nia baptofilino, virino parolema kaj multscia. — Cunĉo, ŝi krias jam de la pordo, bonŝancon vi havas, bonŝancon havas ankaŭ Nonka. Nu, mi deziras al vi feliĉon! — «Kio okazis?» — mi demandas. — Revenis de la haveno Nikola kaj Penju, la filoj de Sider, ili diras, ke en Manĝilari aperis... aperis blanka hirundo! Tute blanka, kiel neĝo! — Nu? — Ĉu vi scias, ŝi diris, kion signifas blanka hirundo? Ĝi aperas nur unu fojon dum cent jaroj kaj eĉ tio ne estas certa, kaj kiu vidas ĝin, tiu resaniĝas, tute gale kiun malsanon li suferas. «Cunĉo, ŝi diras, iru do, ne hezitu! Konduku tien Nonka-n. Eh, ĉu mi povis rezisti? Ekploris la knabino, la patrino ankaŭ insistis, kaj jen, ni venis.

Sed ĉu vere? — demandis Mokanin. — Kie troviĝas tiu ĉi hirundo?

— Mi ja diris al vi, ĉi tie ĝi estas aperinta, en Manĝilari.

— Ĉu blanka?

— Tute blanka.

Mirigite, Mokanin rigardis laŭlonge de la ŝoseo: ĉiutage li venigis ĉi tien, sur tiun ĉi herbejon, la ŝafaron por ripozigi ĝin tagmeze, sed li kvazaŭ nur nun rimarkis, kiom multe da hirundoj estis surflugintaj la telegrafan draton. Kaj tio ja ne estis miriga: proksimiĝis jam la festotago de la Transfiguriĝo de Disinjoro, kaj tiutempe la hirundoj kaj la cikonioj kolektiĝas por migri for. La hirundoj estis tiom multaj kaj tiel dense ili sidis unu apud la alia, ke la telegrafdrato pendis kaj pezis kiel rozario. Multaj ili estis, sed ĉiuj nigraj.

— Do pro tio ni venis — iom pli kuraĝe kaj kun faciligita koro diris la kamparano — mi decidis vin demandi, eble vi vidis ĝin, eble vi aŭdis pri ĝi...

— Ne, frato mia, mi ne vidis ĝin. Blanka hirundo? Mi nek aŭdis, nek vidis ĝin.

Sed tuj Mokanin prikonsideris, ke li povus tute senesperigi tiujn homojn, kaj diris:

— Kaj tamen povas esti tia hirundo. Blanka bubalo, blanka muso, blanka korniko — ekzistas. Eble ekzistas ankaŭ blanka hirundo. Kaj certe ĝi ekzistas, se famo cirkulas pri ĝi...

— Kiu scias? — sopirĝemis la kamparano. Se koncernas min, mi ne kredas, sed ili ja estas virinoj...

Li leviĝis por foriri. Kortuŝita, Mokanin ankaŭ leviĝis por akompani lin kaj por vidi la junulinon. Kiam ili atingis la ŝoseon, la patrino — virino pala kaj deprimita pro la suferoj — de malproksime rigardis sian edzon, kvazaŭ ŝi volus laŭ lia mieno diveni, kion li eksciis. La knabino sidis ĉiam tiel turniĝinte flanke kaj rigardis la hirundojn sur la telegrafdrato.

— La homo asertas, ke la vilaĝo troviĝas proksime — diris la kamparano.

Aŭdinte lian voĉon, la knabino turnis sin. Ŝi estis malgrasa, sub la kovrilo oni apenaŭ povis rimarki ŝian korpon, konsumitan de la malsano, la vizaĝo estis vakskolora, sed la okuloj estis ankoraŭ helaj, ankoraŭ junaj kaj ridetantaj. Ŝi rigardis jen la patron, jen la Mokaninon.

— Nonka, tiu ĉi homo estas vidinta la hirundon — diris la kamparano, kaj rigardis al Mokanin. — Jen, en tiu vilaĝo ĝi troviĝas, tie. Nu, ni iru, eble ni ankaŭ havos la bonŝancon vidi ĝin.

— Ĉu ni vidos ĝin, onklo? — demandis la junulino, kaj ŝiaj klaraj okuloj ekbrilis.

Io leviĝis en la brusto de Mokanin, sufokis lin, liajn okulojn nebuligis larmoj.

— Vi vidos ĝin, infano mia, vi vidos ĝin — laŭte li ekparolis. — Mi vi-

dis ĝin, vi ankaŭ vidos ĝin. Per la propraj okuloj mi vidis ĝin, jen tia — blanka, blanka. Vi ankaŭ vidos ĝin. Dio helpu, ke vi ankaŭ vidu ĝin, ke vi resaniĝu... Ja juna vi estas. Vi vidos ĝin, mi diras al vi, ke vi vidos ĝin... kaj vi resaniĝos, infano mia, havu kuraĝon...

La patrino kunpremis la okulojn kaj ekploris. La alta, grandkorpa vilaĝano ektusis, prenis la bridon kaj enkondukis la ĉevalon.

— Adiaŭ, estu sanaj! — kriis post ili Moganin. — Proksime troviĝas la vilaĝo. Ĉiam iru laŭlonge de la telegrafdrato, ĉiam laŭ la telegrafdrato!

Li longe staris sur la ŝoseo kaj rigardis post la ĉevalveturilo. Li rigardis la patrinon kun ŝia nigra kaptu-

ko, la junulinon, kuŝantan apud ŝi, la altstaturan kamparanon, kiu paŝis kurbiĝinta kaj kondukis la mallertan ĉevalon, kaj super ili, inter ĉiuj du telegrafostoj la hirundoj disflugis, poste revenis kaj denove surflugis la draton.

Enpenŝinte, Moganin revenis al la ŝafaro kaj rekomencis la faradon de la mokasenoj, kiujn li preparis el netanita ĉevalfelo. «Blanka hirundo — li pensis — ĉu ĝi ekzistas?» Sed io premis lian koron, turmentis lin. Kaj lasinte fali la alenon, li ekrigardis al la ĉielo kaj diris:

— Dio mia, kiom multe da suferoj estas en la mondo, Dio mia!

Kaj li denove fiksas la rigardon post la veturilo.

Traduki: **Stefka Ĥristova**

Nikola Stranĝanski

AL L. L. ZAMENHOF

Al vi mi dediĉas ĉi poemon,
al figuro via granda, brila,
al la verko via, kies semon
iam plantis vi en grund' fertila.

Mi komparas vin kun la aŭroro —
signo luma de la nova tago,
la mallumon kiu pelas foren
kaj rebrilas en la blua lago.

Via lingvo milda kaj belsona
ravis kaj inspiris min fajrante,
kaj en mi ne eĥis salv' kanona,
sed la vok' de via Esperanto.

Ĝi provokis min al lukt' aktiva,
al labor' senĉesa kaj al ago
por konstruo de la nova vivo
per la konkurado ĉiutaga.

Tra l' etero kvazaŭ tra la prismo
sin reflektas por la pac' la lukto,
kaj triumfa marŝ' de l' socialismo
garantias ĝin por mondo tuta.

Tial niajn fortojn, kamaradoj,
streĉu ni por bono de l' popoloj
per flirtigo de la verdstandardoj,
sed ne per bibliaj paraboloj.

En animoj niaj brulas flamo,
prometea fajr' en brustoj ardas,
kaj en koroj jen jubilas amo
por feliĉ' homara kaj bonfarto!

Mihail Langov

O, BELSONA NIA LINGVO

O, belsona nia lingvo,
verk' de amo, harmonio,
kiel dolĉe kaj kun digno
sonas via melodio,
la orelojn karesante,
la animojn dorlotante!

Ĉie sur la vasta tero
vibras via tono ĉarma:
de la nordo neĝsevera
ĝis la sudo suna, varma,
de la blanka okcidento
ĝis la flava oriento.

Ĉu vin ne parolas dece,
ekaminte vin konfide,
kun la sama facileco
ĉiu homo, ĉiu ido,
ĉu blankulo, aŭ nigrulo,
ĉu flavulo aŭ blondulo?

Per ŝlosilo via verda
vi disrompas baron, ĉenon,
kun facile kaj sen perdo,
donas vi interkomprenon,
unuigas la homaron
en batal por paco kara.

O, belsona nia lingvo,
verk' de amo, harmonio,
kiel dolĉe kaj kun digno
sonas via melodio,
la orelojn karesante,
la animojn dorlotante.

TRA LA MONDO

Hungario. Kiel tradicie ankaŭ ĉijare la 20 kaj 21 de julio en Budapeŝto okazis Landa Junulara Renkontiĝo. Partoprenis ĝin gejunuloj el kvin diversaj urboj.

Francio. Ĉijare la landa Kongreso de la francaj esperantistoj okazis dum junio en Montélimar. La Kongreson ĉeestis ĉirkaŭ 250 personoj inkluzive la Prezidanto de UEA prof. Canuto. La loka gazetaro favore raportis pri la kongreso kaj la Franca Radio kaj la Radiostacio de Lyon dediĉis kelkminutajn programojn al ĝi.

Germanio. Kvarmembra grupo de junaj geesperantistoj el Karlmarksstadt, DDR, vizitis Bulgarion dum la tagoj de la landa kongreso en Târnovo gastante al la bulgaraj junaj geesperantistoj. Post reveno ili publikigis en la N-ro 8/9 de Germana Esperanto-Revuo ampleksan raporton pri ilia ekskurso.

Pollando. Dum la 29-a Internacia foiro en Poznan funkciis Esperanto-Informejo destinita por helpi kaj kontakti eksterlandajn samideanojn kaj informadi la publikon pri la valoroj de Esperanto en la komerco kaj turismo.

La foira radio-servo ĉiutage disaŭdigis programon pri Esperanto kaj estis disdonitaj miloj da informoj en pola kaj germana lingvoj.

Finlando. En Helsinki la 11—16-an de junio okazis la 12-a Internacia Fervojista E-Kongreso kiu vidis la partoprenon de ĉirkaŭ 300 fervojistoj-esperantistoj el 18 landoj. Okazis fakprelegoj, pridiskuto de iuj organizaj problemoj de IFEF, kaj laboro pri la faka terminaro. La partoprenantoj ekskursis peraŭtobuse al la urbo Orebrö. Oni decidis okazigi la venont-jaran kongreson en Barcelono, Hispanio.

Jugoslavio. «Jugoslavia esperantisto», la organo de JEF en sia n-ro 6—7 k.j. detale raportas pri la II-a Internacia pedagogia semajno okazinta de la 15-a ĝis 24-a de julio en Bohinj (Slovenio) sub la aŭspicioj de UEA kaj Jugoslavia UNESKO-komisiono. Partoprenis reprezentantoj de sep landoj. La seminarion gvidis s-no P. Zlatnar kaj ĉiutage okazis po du-tri referatoj.

La seminario en Bohinj havis la konkretan celon: pridiskuti la problemon pri enkonduko de la infano en aktiva esperanta vivo kaj movado post akirita lingvoscio kaj helpi al la instruado de aliaj instruobjektoj.

Italio. La kongreso de la italaj esperantistoj okazis en la fama ripozloko en la Alpoj Kortina d'Ampezo. Ĝin ĉeestis 300 gekongresanoj inter kiuj 50 eksterlandanoj. La kongreso estis salutita en la nomo de la bulgaraj esperantistoj de V. Oljanov, kiu donacis al la Itala Esperanto-Federacio kaj al LKK esperantajn librojn — bulgarajn eldonaĵojn!

Por la internacia korespondanto

EKSTERORDINARA PROGRESO

Antaŭnelonge nia popolo festis la 16-an datrevenon de la popola ribelo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo kaj la starigon de popoldemokratia sociordo en nia lando. En tiuj 16 jaroj la lando faris grandegan antaŭeniron kiel en la ekonomio, tiel ankaŭ en la kulturo. Nun en nia tuta patrolando bolas entuziasma laboro por plenumo de la kvinjarplano antaŭ la limtempo. Tio ankoraŭ plifaciligos la vivon de la simpla homo, plialtigos la vivnivelon de la popolo.

Jen iuj ciferoj:

Dum la pasinta 1959 jaro la nacia enspezo plikreskis per 21.6% (laŭ la plano devis plikreski nur 8.2%). La ĝisnuna plenumo de la ĉijara plano montras ke ankaŭ nun la nacia enspezo konsiderinde plikreskos.

La produktado de la indusrtio dum la pasinta jaro plikreskis per 25% kompare al 1958.

ЕСПЕРАНТИСТИ — ПРОСЯЦИ

Очакваме най-тържественния момент — откриването на Международния конгрес. До мене седи мълчаливо стройна блондинка. Като узнава, че съм българин тя се усмихва и започва да ми предава своите впечатления от българите. Тя е кореспондирала с няколко български есперантисти. Но българите, казва тя с досада, още от първото писмо започват да искат различни неща. Започват от найлонови чорапи, после блузки, електрически самобръсначки и свършват с пишуща машина. И като задоволят исканията си, или видят, че няма да бъдат удовлетворени престават да кореспондират... Облива ме студена пот. Какво да отговоря? Къде да се скрия?

В залата е тържествено.

* * *

Получихме писмо от унгарски есперантист. „Постоянно идват българи — канени и неканени, искат да ги развеждаме, да им плащаме разнос-

Kiel la pasinta tiel same la kuranta jaro estas karakterizaj per grandegaj sukcesoj en la kapitala konstruado. Dum 1960 ĝi egalas al 7859 milionoj da levoj, kio egalas al la duono de la monrimedoj uzitaj por tiu ĉi celo dum la tuta unua kvinjaro. Jam ekfunkciis aŭ ekfunkcios ĝis la fino de la kuranta jaro grandaj industriaj entreprenoj kiel la cementa uzino apud Vraca, la akumulatora uzino en Pazarĝik, uzino por vitro en Razgrad, la unua turbina grupo de la termoelektra centralo «Marica-oriento» kaj la unua parto de la malfermita minejo «Trojanovo-1», flotacia fabriko kaj minejo «Maĝarevo», la novaj fakoj de la soda uzino «Karl Marks», la novaj fakoj de la sukerfabrikoj en Ruse, G. Orjahovica kaj Kamenovo kaj multaj aliaj. La tuta lando nun prezentas grandegan konstruejon de la nova vivo.

En la agrikulturo la sukcesoj estas ne malpli grandaj. La meza jara plikresko de la agrikultura produktaĵo dum la kvinjaro estis 4.9%, laŭ la tria kvinjarplano ĝi devas esti 6.2%, efektive dum 1959 la ĝenerala plikresko de la agrikultura produktaĵo kompare al 1958 egalas al 18.1% kaj nur de la agrikulturaj kooperativoj — al 31%.

Kiel rezulto de tiuj ekonomiaj sukcesoj plikreskis la realaj salajroj de la laboristoj kaj la oficistoj kaj la enspezoj de la kooperativanoj. Nur dum la kuranta jaro laŭ decido de la registaro estis asignitaj 800 milionoj da levoj por pialtigo de la salajroj de iuj kategorioj de laboristoj kaj oficistoj.

Tiuj ĉi faktoj parolas per si mem. Kaj estas multaj aliaj. Ni sisteme prezentos ilin en tiu ĉi rubriko por esti utiligataj en la internacia korespondado.

ките, да им намираме и място за пренощуване. Ние сме поставени в затруднено положение. . .“

* * *

Ясно е, в случая имаме работа с внуците на бай Ганьо. Те не кореспондират, за да узнаят нещо за непознатата страна, за нейния народ, за борбите на работническата класа. Не. Те гонят материални облаги. Подават ръка за подаяние. „Помогнете на бедния брат!“

Нарамват дисагите и тръгват без средства из Европа. Мускалчетата сега са добили голям асортимент. Те се предлагат във вид на цигари, сливови, мастика, салам, огърлици, ръкавици . . . и предлагат без да се свеият. И просят без да мислят, че излагат своята страна, народа си, че унищожават въздействието на цялата наша пропаганда в чужбина.

Твърде разпространено е напоследък искането на покани за посещение на различни страни. Нашите есперантисти искат, те да бъдат заверени в посолства, в министерства на външните работи и т. н., а не мислят, че всичко е свързано с разходи. На какво основание те предявяват такива искания? Ако желаят някакви услуги, те трябва да заплатят поне направените разходи от есперантистите в чужбина. Защото трябва да се знае, че нашите другари-есперантисти в чужбина не са измежду богатите слоеве и че не живеят в охолство.

С тези позорни факти трябва да се поведе решителна борба. Есперантистите-просяци трябва да бъдат разобличавани. Сега ние няма да посочваме имена. Но в бъдеще всеки който узнае за подобни прояви, трябва да съобщава на ЦК на БЕС и на редакцията на „Булгара есперантисто“ с точните имена на техните автори. Ние трябва безпощадно да разобличаваме такива есперантисти, които учат езика не подтиквани от идеализма на борбата за мир и братство между народите, а от ниски подбуди за търговия, за задоволяване груби материални интереси. Ние трябва да очистим петното върху нашето есперантско движение. Да приковем на позорния стълб есперантистите-просяци!

ABONU POR 1961

LA SUKCESOJ DE LA POPOLKLERECO EN BULGARIO

Nun en Bulgario en la diversaj lernejoj lernas pli ol 1,300,000 personoj. Tio signifas ke el mil personoj de la popolo 170 lernas.

Fiero estas por nia malgranda lando, ke ne ekzistas vilaĝo sen lernejo. Pli ol 80% de la akirintaj fundamentan klerecon, daŭrigas la lernadon en mezlernejoj. Granda helpego por la junuloj estas la profesia instruo. Krome, junaj homoj, kiuj laboras, havas la eblecon plialtigi sian klerecon per vespera kaj foresta lernado. Dum la jaroj de la popola regado la nombro de la studentoj en la universitato plimultiĝis kvarfoje.

40% de la studentoj ricevis ŝtatan stipendion. Por ĉiuj studentoj kaj ankaŭ por granda parto de la lernantaro estas garantita malmultekosta nutraĵo en kantinoj.

Dum 15 jaroj estas konstruitaj pli ol 1,300 lernejoj. En la komenco de marto ĉi-jare la parlamento akceptis leĝon, per kiu oni forigas la lernetaksojn en ĉiuj lernejoj de la lando senescepte. Ĝis tiam la instruado nur en la fundamentaj lernejoj estis senpaga. Nun tio disvastiĝis al ĉiuj kaj ĉiaj specoj de lernejoj. Tio ankoraŭ pli demokratiigas nian kulturen sistemon kaj fortikigas nian antaŭan pozicion en la sfero de la klereco inter ĉiuj ŝtatoj de la mondo.

La senpaga instruado estas grava paŝo en nia vivo. Ĝi premias pli altajn sukcesojn en nia kulturo.

TRA LA GAZETARO

«Stalinec», Dimitrovgrad (27. VII. 1960) — artikolo «Kongreso de la paco, amikeco kaj internacia solidareco» de M. Ĉolakov, pri la bulgara E-kongreso en Târnovo.

«Iskra», Kazanlâk (6. VIII. 1960) okaze de la 15-a datreveno de eksplodo de atombombo en la japana urbo Hiroŝima oni publikigis 4 rakontetojn de okulvidintoj, tradukitajn el Esperanto de Dimo Martinov.

«Septemvri», Stara Zagora (9. VIII. 1960) — artikolo «Por paco kaj amikeco» de Ivan Zahariev, en kiu li rakontas en treege interesa formo pri ricevitaĵoj el fremdlando, precipe el Okcidento, leteroj.

«Dunavski konservopromiŝlenik», Ruse (5. IX. 1960) — en la esperanta rubriko aperis informo pri la somerumejo en vilaĝo Drujevo.

Jurnalo «Elpromska iskra», Ruse (9. IX. 1960) — informo pri nova kurso de Esperanto en uzino «Najden Kirov» — Ruse.

Jurnalo «Dimitrovec», Ruse (9. IX. 1960) — informo «Frataj gratuloj», — pri la gratuloj, kiujn ricevis la esperantista sekcio ĉe uzino «Georgi Dimitrov» en Ruse el Vietnamio, Pollando kaj Germana Demokrata Respubliko okaze la 9-a de septembro.

Iv. Sarafov

LECIONOJ DE ESPERANTO

Laŭ invito de la Redakcio de la pedagogia revuo «Esperanto kaj Kulturo» (aperanta en Francio), nia samideano Atanas D. Atanasov — Adadonis specialan kurson de Esperanto en 22 lecionoj, kiuj aperis sinsekve en 22 numeroj unue en la nomita revuo kaj plue en la franca periodaĵo «Esperanto et Culture». La lasta (22-a) leciono aperis en la januara N-ro de la kuranta jaro.

**Partoprenu la kampanjon por varbado de abonantoj al BE
por 1961! La abonkotizo ĝis 31. XII estos 12 lv.,
post tiu dato — 14.**

MEMORLIBRO PRI LA ZAMENHOF-JARO

Eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof. Redaktoro: prof. d-ro Ivo Lapenna. Eldonis UEA, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono 1960, 22×29 cm., 104 p. plus 16 foto-paĝoj. Prezo: 12,50 gld. Mendebla ĉe UEA. (Aperis nur bindita).

La aperigo de tiu ĉi libro estas la plej elstara kaj daŭra honorigo de D-ro L. L. Zamenhof okaze de la centjara datreveno de lia naskiĝo. Simile al monumenta mejloŝtono laŭ vojo de la homaro ĝi atestos antaŭ la estontaj generacioj pri nia granda estimo al la rava personeco de nia Majstro. Krom tio ĝi fiksas poreterne la altan pritakson al lia realigita iniciato krei netuŝeblan fundamenton de la lingvo internacia. La traleginto havas la daŭran impreson, kvazaŭ li havis eblecon flari la bonodoron de la spirita florkrono majstre plektita el nevelkeblaj artikoloj, verkitaĵoj kun vervo de eminentaj esperantistoj kaj fakuloj.

En la unuaj artikoloj kelkaj aŭtoroj traktas la biografion de Zamenhof. En la sekvantaj artikoloj oni aprezas el diversaj vidpunktoj la valoron de Esperanto. Nepre menciindaj tiurilate estas la artikoloj de prof. d-ro E. A. Bokarev, prof. d-ro I. Lapenna kaj V. Setälä. Precize kaj trafe oni priskribas la karakterajn trajtojn de la lingvo internacia kaj konvinke montras la efekton el ĝia uzado.

En apartaj artikoloj multaj eminentaj aŭtoroj atentigas pri la utiligo de Esperanto en la kampo de la literaturo, scienco, privata kaj socia vivo. M. Boulton prezentas Zamenhof-on kiel pioniran poeton. J. Francis vidiĝas la «Integron kaj latentojn en la verko de Zamenhof». D-rino C. C. Guglielminetti konture skizas la bildon de «La plej juna literaturo en la mondo». Per komparaj ekzemploj el angla, franca kaj rusa poezioj W. Auld elokvente klarigas la tradukpovon de Esperanto en la belarta literaturo.

Pri la uzo de Esperanto en la scienco meritas nepran mencion la artikoloj de prof.

d-ro G. Canuto, prof. d-ro H. Sirk, prof. d-ro S. Nishi kaj C. St. Bowitz. Ne mankas teoriaj artikoloj: Jen d-ro G. F. Makkink emfazas akcentas pri la rolo de Zamenhof en evoluo de la komunikado kaj P. Davis substrekas la signifon de Esperanto pri la teorio de komunikado. Havas lokon ankaŭ kelkaj poemoj de L. L. Zamenhof, K. Kalocsay, P. Thorsen, F. Szilagyi, E. Privat ka. En kelkaj konvenaj lokoj inter la artikoloj estas presitaj pensoj de Zamenhof, ordigitaj laŭ la temoj. La presitaj fotografiaĵoj en la fino plej ofte havas historian signifon.


Konklude laŭdinda estas la eldono, sed ne senripoĉa.

Mankas speciala artikolo dediĉita al la porpaca agado de la esperantistoj. Estas nerefutebla fakto, ke laŭ sia interna senco la Esperanto-movado estas porpaca, sed... ĉu estas utile prisilenti tion ĉi? Tute ne! Kaj se en la pasinteco oni povis iumaniere «argumenti» tion ĉi, nun ĝi ne plu estas ebla, ĉar la posedo de nukleaj armiloj endanĝerigas entute la ekziston de la homa gento. La esperantista popolo estas malgranda kaj dissemiita tra la tuta mondo, sed se ni deziras esti egalrajtaj al la ceteraj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj popoloj, ni devas laŭtigi nian protestan voĉon kontraŭ la militismo kaj militpreparo. Decas al la esperantista popolo subteni la ideon pri kompleta senarmiĝo, pri kunekzistado kaj reciproka toleremo inter la ŝtatoj kun malsama sociordo, pri aktiva ekonomia kaj kultura kunlaboro, pri daŭre kreskanta amikeco inter la popoloj.

Preskaŭ la tuta mondo konsideras nun la batalon por konservo de la paco kiel sian unuan fundamentan taskon. En tiu ĉi decida momento la esperantista popolo ne devas forlasi la ĝustan vojon de la progresanta homaro. Tute kontraŭe nia kultura kaj internacia popolo devas tutforte kaj per sia tuta sperteco kontribui pri la mortiga sufoko de la milito antaŭ ĝia fatala naskiĝo.

Ni rekomendas la libron al niaj legantoj.

Canko Murgin



Junulo malsane kuŝas en la lito. Bela knabino kun granda florbukedo ekfrapas la pordon de la malsanuleja ĉambro. Maljuna virino malfermas la pordon.

— Mi deziras vidi Petkon, deklaras la knabino. Mi estas lia fratino.

— Ho, mi ĝojas konatiĝi kun vi, respondas la virino. Mi estas lia patrino.

* * *

Anglo, franco, germano kaj skoto volas fari ekskurson kaj piknikon. Ĉiu promesas por ĝi kunporti ion. La anglo kunportas botelon da viskio, la franco blankan panon, la germano kolbason kaj la skoto kunportas — sian fraton.

* * *

Unu skoto havis duelon kun unu franco. Kiam ili veturis kune al la loko, kie devis okazi la duelo, la franco aĉetis bileton ankaŭ por reveno. La skoto pagis nur la vojon tien.

— Vi ne kredas, ke vi revenos? — ekmiris la franco. — Mi ja ĉiam aĉetas bileton por reveno.

— Mi ne. — respondis la skoto — Mi veturas reen ĉiam per la bileto de mia kontraŭulo.

* * *

La instruisto: Kiu estas la plej varma loko sur la terglobo?

La lernanto: Ĉe la nigra tabulo, k-do instruisto.

* * *

Aleksandro Hercen estis kondamnita je ekzilo en Siberio. Antaŭ lia forveturo li estis akceptita de generalo Stroganov. La dekorita per ordenoj generalo volis konsoli Hercen.

— La homo devas havi kuraĝon porti sian krucon — diris la generalo.

— Vi havas, ŝajnas, tre multe da kuraĝo, kiam vi portas viajn krucojn — respondis Hercen.

* * *

Ludoviko XIV verkis versaĵon kaj donis ĝin al Boileau por opinio.

— Vi povas ĉion — respondis Boileau — Vi ekdeziris verki unu malbonan versaĵon kaj vi sukcesis pli ol oni povus atendi.

* * *

Post la unua prezentado de unu lia teatraĵo Bernard Show dankis la interpretintinon de la ĉefa rolo.

— Estis eksterordinare, belege, senzacie...

— Ho! Vi troigas — modeste respondis la aktorino.

— Sed mi havas antaŭvide la teatraĵon — ekdiris Show.

— Mi ankaŭ — respondis al li la aktorino.

* * *

Ginsberg vojaĝis al Ameriko per vaporŝipo. En la restoracio de la vaporŝipo li rezervigis al si lokon ĉe unu franco, kiu je ĉiu tag- aŭ vespermanĝado renkontis Ginsberg per la ĝentila «Bon appétit». Opiniante, ke la franco konatiĝadis kun li, Ginsberg samtiel ĝentile respondadis: Ginsberg.

Tiu ĉi ceremoniaro ripetiĝis multfoje dume iu klarigis al Ginsberg, ke «bon appétit» franclingve signifas «bonan apetiton».

La saman vesperon Ginsberg rapidis ĝentile turni sin al la franco:

— Bon appétit.

Al tio la franco duoble pli ĝentile respondis:

— Ginsberg.

DEZIRAS KORESPONDI

CSR

S-ro Eugen Hysek, Garkeho 56, Svytavy — 32-jaraĝa oficisto, nova esperantisto.

Jaroslav Kosik, Detenice 104, kun ĉl. pri ĉl.

Holicky Stanislav, Tyniště n. Orlici, Lipska ul. 252 — Interŝ. PM, PK kaj F.D.C.

HUNGARIO

Pinter Grörgy, Pápá, Kilián Gy I. A. — ler-
nanto, kun gejunuloj.

FRANCIO

Rey Marc, 19 Rue Chartran, Carcassonne (Aude) — 35-jara fervojisto — interŝ. PK, PM, leterojn.

Gaston Tremblay, Cité de Gaubre 45, Brive (Correze).

USSR

Vitalij Kirjjak, Glavpočtamt, poste restan-
te, Kiŝinev — 19-jaraĝa studento de la me-
dicina instituto. Pri ĉl.

Ĉerkasov Viktor, str. Lenin 64, kv. 180, Ki-
ŝinev — studento de la lasta kurso de medi-
cina instituto — pri ĉl.

Lubomir Sobanski, Ĥmelnicka obl. Duna-
jevskij r. Minkivci. — kun ĉl.

V. Tetuškin per. Polzunova 6/10, kv. 24.
Ĥarkov - 14 — kun ĉl.

Rondeto de l' internacia amikeco ĉe Palaco
de Pioniroj, Ĥmelnickij, dez. kor. kaj interŝ.
PM, PK, semojn de floroj kun gepioniroj kaj
gelernantoj el ĉl.

Popov A. A., Kuzneckaja 101-A, kv. 5, Sta-
lingrad 3 — kun ĉl, interŝ. BK.

Malceva Klavdija, Rostov-don, Novij go-
rod, Baltijskaja 3 — 26-jara instruistino, in-
terŝ. BK — kun ĉl.

Popova Rimma, Rostov-don, ul. Engelsa
206, kv. 34 — 24-jara instruistino, interŝ. BK,
kun ĉl.

Viktoria Rukavcova, Rostov-don, Pr. K.
Marksa 54/101, kv. 83 — 25-jara mekanika
inĝenierino, interŝ. BK kun ĉl.

Irina Dolmatovskaja, Rostov-don, ul.
Ŝaumjana 95, kv. 2 — instruistino, interŝ. BK
kun ĉl.

ARGENTINO

Edgardo Mancusso, Pje. Argentino 2729,
Rosario, kun gestudentoj el tutmondo.

POLLANDO

Edward Piskorski, Piekary Sl., ul. Buczka
nr. 50 — szk nr. 4.

Skiba Barbara, Al. Wiepodleglosci 46/50 m
119, Warszawa — 24-jaraĝa fraŭlino.

Wlodavezyk Wacława, ul. Obozowa 71, m.
13, Warszawa — 21-jaraĝa fraŭlino.

GERMANIO OKCIDENTA

Dieter Kremp, Kastellstrasse 17/17a/ Karls-
ruhe-Durlach — interŝ. PM.

GREKLANDO

Kika Polimeropulu, Likurgu 163, Kallithea-
Athine — 19-jara studentino pri la franca
lingvo, dez. kor. kun fraŭlinoj 20-28 jaraj.

NEDERLANDO

H. Delsman, Filosoficum, Warmond — pri
filozofio, ekonomio, politiko, lingvoj, poŝt-
markoj ktp..

G. Selhorst, Burg. Peecklaans, Schoorl —
pri etnologio, geografio kaj aliaj temoj.

JAPANIO

Ĉirkaŭ mil japanaj gejunuloj (gimnazia-
noj, gestudentoj, geoficistoj k. a.) serĉas ko-
respondantojn. Bonvolu skribi nepre indikan-
te aĝon, sekson, intereson al tiu adreso:

Kenzo Kusakabe, c/o Mukarami, 53 Shiba-
shimotakanowa-machi, Minato-ku, Tokio.

Kazuyoshi Matsuuchi, Minamiogishima
1900, 3, Koshigaya-shi, Saitama-ken — 19-
jara junulo interŝ. leterojn, PK, PM.

